

La klubo Esperanto en Chalonnais proponas staĝon de la 19a ĝis la 26a de aŭgusto 2018 en Métabief, en la Altjuraso, *kun* aŭ *sen* staĝo de esperanto

Gastejo

« Les Sapins de l'Amitié » (La Abioj de l'Amikeco) estas ĉaledo, kiu kapablas akcepti 80 homojn (grupojn, familiojn...) tutjare.

Ĝi situas en la centro de Métabief, mezmontara skiejo, apud la svisa limo.

La gastiga skipo akceptos vin kaj zorgos pri via restado en 4, 6 aŭ 12-litaj dormo-ĉambroj ĉe la 1a aŭ la 2a etaĝo.

Estas ankaŭ granda teraso kaj ĝardeno (4000 m²)

Nia kuiristo kuiras bonkvalitajn manĝojn kaj proponas adaptitajn manĝojn laŭeble.

Purigado de la vazaro estas mane farita de la feriantoj mem (amika kaj muzika etoso !).

Same ni bezonos vin por pretigi kaj malpretigi tablojn.

Partoprenantoj, kiuj deziras pli da komforto, rezervu hotelon aŭ alian gastejon.

Eblos ankaŭ tendumi.

Ili povos nur tagmanĝi kaj vespermanĝi kun la aliaj partoprenantoj en la ĉaledo.

Eblos resti nur kelkajn tagojn.

Aktivaĵoj (decidu je la komenco de la restado)

- Malkovro de la regiono: piedmigrado, aŭto ; ĝia faŭno et floŭro
- Akvaj ebloj ĉe la lago de Malbuisson : naĝado, pedalboato, ... arbaraventurejo, kegloludejo.
- Vizitoj : Fromaĝejo, Fumaĝejo de ŝinko kaj kolbaso, Château de Joux (kastelo), Naturrezerveja domo de lago de Remoray, Montara muzeo en La Chapelle des Bois, fonto kaj akvofalo de la rivero Doubs, Citadelo de Besançon, Salejoj d'Arc et Senans kaj Salins-les-Bains, Grotoj de Vallorbe, ktp.

Tri aŭ kvar nivelaj kursoj eblas: Komencantoj / komencintoj, Progresantoj, Paroliga kurso,

kun Ŝtano Marček, Nina Korjenevskaia, Roland Cuenot, Jacqueline Poux.

Disvolviĝo de la restado kun kurso, dimanĉon 19-an : akcepto posttagmeze, aperitivo

Lundon 20-an : eko de la kursoj Semajne :

undon 20-an : eko de la kursoj Semajne :

- 9a15-12a30 :kurso
- 14a-17a :agadoj
- 17a15-18a30 :kurso aŭ agado
- 20a30 :vespero (ludo, prelego...)



Disvolviĝo de la restado **sen kurso** :

Bonvolu ĉeesti akurate je manĝoj, pikniko por tagmanĝi eblas.

Fino de la kursoj kaj de la aktivaĵoj: sabaton vespere

Fino de la restado : dimanĉon la 26an post la tagmanĝo.



Ni proponas turisman aranĝon, dimanĉon la 26an de aŭgusto

- 9 h : Veturado laŭ la rivero Loue
- 10h : Urbo Ornans kun Muzeo Courbet (impresionisma pentristo)
- 12h30 : Pikniko
- 14 h : Vizito de « Taillanderie » (fabriko pri klingoj de laboriloj, per akvo energio), en vilaĝo Nansous-Sainte-Anne

Prezo : 40€inkluzive dimanĉa vespermanĝo, nokto, matenmanĝo kaj vizitoj, pagota en la ĉaledo.